

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 73, novembro-decembro 2024



Universala Esperanto-Asocio

UEA festos 70 jarojn da kunlaboro kun Unesko

“UNESKO kaj Esperanto: 70 jaroj da kunlaboro pri lingvaj homaj rajtoj” estas la titolo de festa kunveno okazonta en la parlamenta palaco en **Montevideo, Urugvajo**, la 10-an de decembro, 2024, precize sepdek jarojn post aprobo de rezolucio de la Ĝenerala Konference de Unesko kiu kunvenis en tiu urbo en 1954. La rezolucio rekonis la rezultojn atingitajn de Esperanto en la kampo de intelekta interŝanĝo kaj kiel rimedo por pliproksimigi la popolojn de la mondo. Ĝi plue notis, ke tiuj rezultoj respondis al la celoj kaj idealoj de Unesko. La rezolucio rezultigis starigon de konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko kaj, post nelonge, kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (EKOSOC). Tiu kunlaboro daŭras ĝis la hodiaŭa tago. La kunveno, organizita de Esperanto-parolantoj en Urugvajo kaj Argentino, kun helpo de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), inkluzivos partoprenon el la kontinentoj de Suda kaj Norda Ameriko – kaj preter tio.



La sepdeka datreveno de la Montevidea Rezolucio estas bona okazo por rememori la historion kaj signifon de tiu dokumento, kiu rekonas la komunajn celojn kaj idealojn de Unesko kaj Esperanto por konstrui pacon en la mondo pere de kulturo, edukado kaj scienco.

Raporto emfazis lastatempajn atingojn pri lingvo kaj homaj rajtoj


En raporto al ESF (Esperantic Studies Foundation, Usono), la Komitato de Neregistaraj Organizo pri Lingvoj, konsista komitato de CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizo), dankis la fondaĵon pro ties praktika helpo en faciligo de serio da kunvenoj kun funkciuloj de UN en la daŭro de la jaro 2023, pri lingvaj demandoj, interalie:

- **Podia diskuto pri “Novaj horizontoj en traduka kaj interpreta teknologio” (aprilo 2023)** kune kun reprezentantoj de la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj (AIIC) kaj la projekto Eŭropa Viva Tradukanto (ELITR).
- **Grava Tema Kunveno en junio 2023 pri “Multlingvismo trans la UN-Sistemo”** kunorganizita de la Konstantaj Misioj de Andoro, Burundo, Ekvatora Gvineo, Ĝibutio,

Hispanio kaj Kanado, kune kun la Observa Misio de Frankofonio. La aranĝo kunvenigis la Prezidanton de la Ĝenerala Asembleo Amb. Csaba Kőrösi, la Vican Ĝeneralan Sekretarion (VĜS) pri Ĝeneralasemblea kaj Konferenca Mastrumado (kiu ankaŭ rolas kiel Kunordiganto de Multlingvismo de UN), la VĜS pri Juraj Aferoj, la VĜS pri Politiko, kaj aliajn gvidantojn de UN, kune kun Membraj Ŝtatoj, UN-burooj, civilsociaj organizoj akredititaj de EKOSOK, kaj sciencaj fakuloj. Oni proponis interpretadon en ĉuj ses oficialaj lingvoj de UN, plus Esperanto.

- **Dialoga forumo en decembro 2023 pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj**, kun monde konata fakulo pri lingvaj rajtoj profesoro Phillipson. La dialoga forumo markis la 75-an jubileon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Mesaĝo okaze de UN-Tago alvokis al subteno de UN dum kriza periodo



“Malgraŭ cinikismo de potenculoj kaj duboj de multaj ordinaraj homoj kiuj hodiaŭ suferas, la espero de mondo sen militoj, kie ĉies homaj rajtoj estas respektataj, kaj kie ĉiuj homoj havas voĉon en spirito de justeco kaj demokratio, ankoraŭ resonas tra la mondo 79 jarojn post la ekvalidiĝo de la Ĉarto de UN la 24-an de oktobro 1945.”

Per la ĉi-supraj akraj vortoj komenciĝas la mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj 2024. La mesaĝo pluiras al cito de la Ĝenerala Sekretario de UN António Guterres' en liaj komentoj dum la lastatempa 79-a Ĝenerala Asembleo de UN: “Homoj de la mondo fidus al ni – kaj venontaj generacioj retrorigardos al ni. Ili konstatu, ke ni troviĝas ĉe la flanko de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj... flanke de niaj komunaj valoroj kaj principoj... kaj ĉe la ĝusta flanko de la historio.”

La mesaĝo de UEA atentigas, ke “UN restas inkluziva kaj reprezenta korpuso por plani kolektivajn agadojn. Tamen ni bezonas la sindevigojn de [la] membraj ŝtatoj – al la propraj popoloj kaj al la mondo.

“Ni, la popoloj, rezolute postulas, ke niaj landoj realigu la celojn de tiu esperplena Ĉarto. Ke ili konservu la internacian pacon kaj sekurecon, praktiku toleremon, evoluigu amikajn rilatojn, unuiĝu por solvi internaciajn problemojn, kaj harmoniiĝu. Ĉiam restos potencialaj kaŭzoj de konflikto, sed ili solviĝu per kunlaboro en la spirito de la Ĉarto de UN.”

“Kunlaboro postulas reciprokan interkompreniĝon kaj reciprokan konfidon. Konfido estas antaŭkondiĉo de paco, kaj konstruata per aŭskultado kaj akceptado, per rekono kaj respekto. En tiu kampo la lingvo estas la fundamenta bazo de komunikado, kaj multlingvismo kaj egaleca komunikado trans la lingvoj estas fundamenta valoro por establi pacon kaj konfidon.”

La mesaĝo finiĝas per promeso de UEA subteni la Ĉarton de UN: “Universala Esperanto-Asocio antaŭenigas la spiriton de la Ĉarto tra la tuta mondo pere de ... Esperanto. Per multlingvaj voĉoj, kaj speciale per la Internacia Lingvo Esperanto, ni reasertas la principojn kaj celojn de Unuiĝintaj Nacioj, kaj rekonfirmas nian promeson kunlabori por pli bona mondo por ĉiuj.”

UEA laŭdis la laboron de tradukantoj

En lastatempa mesaĝo okaze de la Traduka Tago, 30 septembro 2024, UEA laŭdis la laboron de tradukantoj kaj tradukistoj je superado de lingvaj bariloj: “El ĉiuj formoj de nejusta diskriminacio menciitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la plej subtaksata estas la diskriminacio surbaze de lingvoj. En mondaj aferoj, en scienco, en kulturo kaj en ĉiuj aliaj formoj de homaj rilatoj, la riĉa diverseco inter la lingvoj funkcias samtempe kiel fonto de scioj kaj esprimado, kaj barilo al la tutmonda komunikado. Same, la relativa prestiĝo de certaj lingvoj, kaj ilia disvastiĝo, favoras certajn lingvojn super aliaj en difinitaj cirkonstancoj, kaj sekve ofte produktas nejustan diskriminacion.”



“La ĉefa faciligilo kaj egaligilo de komunikado inter la lingvoj, kaj sekve de la komunikado inter la homoj, estas aktuale la tradukado. Tradukado estas esenca vojo por konstrui pli justan mondon, alproksimigi popolojn, antaŭenigi dialogon, kaj krei interkompreniĝon kaj kunlaboron.”

“La ĉefa faciligilo kaj egaligilo de komunikado inter la lingvoj, kaj sekve de la komunikado inter la homoj, estas aktuale la tradukado. Tradukado estas esenca vojo por konstrui pli justan mondon, alproksimigi popolojn, antaŭenigi dialogon, kaj krei interkompreniĝon kaj kunlaboron.”

La mesaĝo plue atentigas, ke “tradukantoj kaj interpretantoj portas sciojn de unu lingvo al alia, disvastigas sciencon kaj kulturon, kaj, je individua nivelo, savas vivojn, ebligas pacon kaj helpas niajn malfortajn kaj persekutatajn gefratojn, ofte sub malfacilaj, eĉ vivminacaj, cirkonstancoj.”

En tiu senco, UEA rigardas tradukantojn kiel engaĝitojn en laboro paralela al la propraj klopodoj superi lingvajn barilojn: “La laboro de Universala Esperanto-Asocio, kiu subtenas la ideon de dua, internacia lingvo por ĉiuj homoj, paralelas tiun de la tradukado: UEA konstante reasertas la gravecon de gepatraj lingvoj, kaj memorigas la internacian komunumon, ke ni devas pensi ankaŭ pri la lingva aspekto de la tri kolumnoj de UN: Paco, Evoluigo kaj Homaj Rajtoj. Same kiel tiuj tri aferoj integriĝas, lingvoj estas esenca elemento por aŭskulti kaj alproksimigi la tutan homaron.”

“En tiu ĉi tago, ni ree donas nian subtenon al multlingvismo kiel kerna valoro de UN, salutas la internaciajn organizaĵojn de tradukistoj kaj interpretistoj, kaj reasertas nian celon antaŭenigi, speciale per la Internacia Lingvo Esperanto, interkompreniĝon kaj estimon inter la popoloj.”

Esperanto en supera edukado

Kursoj pri Esperanto kaj interlingvistiko funkcias en universitatoj en multaj landoj. Unu el la historie plej fruaj estas la katedro de Esperanto kaj interlingvistiko en la Universitato de Amsterdamo, **Nederlando**, fondita baldaŭ post la Dua Mondmilito kaj nuntempe estrata de prof. Federico Gobbo.

Lastatempe notitaj en novaĵaj raportoj estas novaj kursoj aŭ programoj pri Esperanto kaj interlingvistiko en granda diverso de institucioj tra la mondo, interalie la Federacia Universitato de Ceará (**Brazilo**), Universitato de Tianjin pri Scienco kaj Teknologio (**Ĉinio**), Honder-Kolegio pri Arto kaj Scienco (Hohhot, **Interna Mongolio, Ĉinio**), Universitato de Léon (**Hispanio**), Universitato AGE de Scienco kaj Teknologio kaj Jagelona Universitato, Krakow (**Pollando**), Universitato Jadavpur (Kolkato, **Hindio**), Universitato de Tours (**Francio**), kaj la Universitato de Kostariko (**Kostariko**).

Bedaŭrinde la magistra programo en la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano, **Pollando**, finiĝos, post preskaŭ tridek jaroj, pro emeritiĝo de la fakestro, profesoro de interlingvistiko Ilona Koutny, kaj fermiĝo de la fako. Tripersona ekzamena komitato, nome prof. Sabine Fiedler (Germanio), Prof. Gong Xiaofeng (Ĉinio) kaj d-ro Markos Cramer (Germanio / Argentino), lastatempe aljiuĝis magistrajn diplomojn al dek studentoj en la fina grupo.

Interlingvistika Sesio en la 21-a Internacia Kongreso de Lingvistoj, okazinta en la Universitato Adam Mickiewicz en septembro, enhavis referaĵojn pri Esperanto kaj rilataj temoj prezentitajn de fakuloj el **Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Kanado, Kostariko, kaj Turkio**. Esperantistaj fakuloj ankaŭ reprezentigis en sesioj pri lingvopolitiko, gestolingvoj, kaj historia lingvistiko.

La programo pri Esperanto kaj interlingvistiko en Poznano elkreskis el la iama programo pri Esperanto en la Universitato ELTE en Budapeŝto, **Hungario**. La universitato lastatempe organizis konferencon, en kunlaboro kun la poznana universitato, por marki la centjariĝon de la naskiĝo de ĝia fondinto, István Szerdahelyi.